SOVETIA ESPERANTISTA JUNULARA MOVADO

# Aktuale

SEJM

Esperanto servu pacon!

A K T U A L E

Monata informilo de Sovetia Esperantista Junulara Movado

La agadjaro 1977/78 №4(48) Decembro

## ALTIGU LA KVALITON DE LA INFORMADO!

Por altigi la kvaliton de nia informado (propagando, popularigo), estas necese akcenti ĉion, kio montras la kulturan kaj praktikan valorojn de la Internacia Lingvo. Per ĉiuj eblaj rimedoj ni informu pri niaj atingoj, pri la movado, pri Esperanto ĝenerale. Pri tiuj ĉi demandoj la vasta publiko apenaŭ ion scias, kaj eĉ kleraj personoj havas preskaŭ nenian aŭ en plej bona kazo nur mankan kaj tial deformitan bildon.

Ĉiutaga tasko de niaj klubanoj kaj individuoj estu - saĝe kaj ne troigante informadi pri Esperanto kaj pri ĉiuj demandoj ligitaj kun la Internacia Lingvo. La propagando devas esti konstanta, kaj por ĝi ni uzu ĉiujn eblajn rimedojn. La rimedojn de la informado oni povas klasifiki en tri kategorioj: amasaj rimedoj - por pli ol mil personoj, grupaj rimedoj - por dek ĝis kelkcent personoj, individuaj rimedoj - por malpli ol dek personoj.

I. A m a s a i n f o r m a d o

1) Televido. Nun ni povas uzi ĝin pli ofte kaj libere, ol dum antaŭaj jaroj. La reporteroj nun ĉasas novajn interesajn temojn, do eluzu la eblojn! La informoj estu tre variaj: fotoj, desegnaĵoj, filmoj. Se la elsendo estas kolora, uzu lumbildojn. Por plivigligi la elsendon, prezentu kantojn (se via klubo ne disponas pri bonaj kantistoj, prefere uzu E-diskojn). Estas dezirinde, ke en la programo estu multaj homoj, tio pli efikas ol seka rakonto de sola raportanto. Sian TV-sperton al vi povas rakonti Ufa, Krasnojarsk, Riga k.a. Por havi altkvalitan fotomaterialon, nepre kontaktu Fotoservon de SEJM.

2) Radio. La lokan radion tage aŭskultas plejparte hejmmastrinoj. Pli valoras partopreno en junularaj vesperaj elsendoj. Por ili nepre proponu diskojn kun E-kantoj. Poste, por plialtigi intereson de la redakcioj, organizu leterojn de klubanoj kaj iliaj amikoj, ke ili petu disaŭdigi kantojn en E. La praktiko jam pruvis, ke la redakcio respondas, se venis almenaŭ 2 - 3 leteroj. Dum la lastaj jaroj estas fonditaj radiocentroj en uzinoj kaj institutoj - ankaŭ iliaj elsendoj atingas kelkajn centojn da aŭskultantoj. Tiaj radiocentroj tre volonte akceptas freŝajn materialojn, ĉar ili ĉiam soifas novajn temojn. Atingu bonajn rilatojn kun la redaktorojn, fondu konstantajn E-rubrikojn: ja prepari 10-minutan materialon por ĉiusemajna elsendo oni povas tre facile.

3) Gazetaro. Nun la ĵurnaloj sufiĉe ofte akceptas artikolojn pri E. Vere, se oni regule publikigas, baldaŭ ekmankas materialoj, sed eliro estas tre facila. Por tio ja ekzistas Informa Kolekto de SEJM: indiku, ke aliurba ĵurnalo publikigis jenan materialon:... (Tasko de ĉiu klubo estas nepre akiri 50 ekz. da propraj publikaĵoj kaj sendi por Informa Kolekto: nur reciproka helpo donos fruktojn en nia ĉi-direkta laboro.) Ne preterlasu la regionajn ĵurnalojn: se en respublika aŭ centra gazeto io aperis, tuj provu reeĥi en la regiona gazetaro. Plej facile estas penetri en uzinaj kaj institutaj gazetoj, ĉar ili volonte aperigas materialojn pri faroj de siaj laborantoj aŭ studentoj.

II. G r u p a   i n f o r m a d o

1) Prelegoj. Ili estu ne tro longaj: ne pli ol 20 - 30 minutoj. Por varIigi la enhavon, kunprenu fotojn, sonbendojn, lumbildojn ktp. Antaŭ la prelego aranĝu ekspozicieton, ĉar tiam la aŭskultantoj jam komprenos pli rapide, pri kio temos. La praktiko konvinkas, ke pli efikas prelego aranĝita kiel eta ekskurso tra Esperantujo, dum kiu vi montras helpajn materialojn kaj tuj respondas al demandoj. Nia publiko tiel kutimiĝis al diversaj prelegoj, ke eksidante antaŭ la prelegànto oni tuj komencas okupiĝi pri propraj aferoj. Malebligu al la publiko enui dum via prelego! La preleganto devas konsideri la nivelon de la aŭskultantoj, rilatu al ĉi tiu demando serioze.

2) Vesperoj, koncertoj. La arta spektaklo malfermas novajn vojojn, ĉar montras Esperanton uzata en diversaj belartaj sferoj: kanto, deklamo, teatro ktp. Ĝi estas tre taŭga ilo por veki la konscion de esperantistoj mem, sed plej forte ĝi efikas al la neesperantista publiko, pruvante la taŭgecon de la lingvo kaj instigante al ĝia lernado. La koncertoj estas neneglektebla ŝanco por atingi la ĝeneralan publikon. Evidentege, la koncertoj devas havi la necesan artan nivelon: se oni kantas, oni kantu ĝustatone, se oni teatras, oni parolu klare kaj imprese, gestu konvene ktp. Fuŝa muzikludo, senzorga aŭ tro patosa deklamo ridindigas ne nur la programeron, sed la tutan vesperon kaj la movadon ĝenerale.

Dum la vesperoj estas nerekomendinde aranĝi longajn oficialajn partojn. Provu pleje eluzi ĉion, kio helpas akiri kontakton kun la publiko: ornamu la salonon, ne forgesante bonkvalite desegnitajn sloganojn, aranĝu multkoloran ekspozicieton, pendigu murgazetojn. Dum koncerta paŭzo faru kurtan prelegeton pri la Internacia Lingvo, dum dancpaŭzoj montru lumbildojn (se eble, filmojn) pri la someraj renkontiĝoj. Se la vespero estas organizita ĉe tabloj kun frandaĵoj, klopodu prizorgi, ke ĉe ĉiu aparta tablo sidu almenaŭ po unu esperantisto, kiu povus en pli intima medio rakonti pri Esperanto.

3) Ekspozicioj. Pri ili jam temis aparte ("A"-10(43), p.104 - 105. - La red.). Memoru, ke nur zorga preparado donos efikon! La ekspozicioj estu bonkvalitaj: ja en ĉiu klubo oni povas trovi pentriston, kiu helpus bele ornami ĉiujn materialojn. Se neniu el la klubanoj kapablas tion fari, oferu el la kluba kaso: en ĉiuj laborlokoj estas pentristoj, kiuj volonte kromlaborus. Profitos kaj la pentristo, kaj la klubo, kaj la movado.

4) Afiŝoj, montrofenestroj, anoncoj. Provu fari ilin multkoloraj, regule ŝanĝu materialojn en montrofenestroj, evitu erarojn en la nacilingvaj tekstoj. Afiŝojn pendigu en sufiĉe multaj uzinoj kaj institutoj, uzu multhomajn lokojn, interkonsentu kun direktoroj de kulturdomoj, kluboj, kinejoj pri pendigo de la afiŝoj.

5) Murgazetoj, albumoj. Ĉiu klubo nepre devas eldoni ĉiumonatan murgazeton. Vi gajnos duoble: unue - tio faros la klubkunvenojn pli interesaj, due - per la murgazetoj vi povas informi ankaŭ neesperantistojn pri via laboro. Pendigu ilin komence en la klubejo, poste portu al viaj lernejoj, institutoj, laborejoj. La plej interesajn konservu por ekspozicioj. En ĉiu klubo nepre estu fotoalbumoj - ja ĉiu klubano havas aron da fotoj el diversaj renkontiĝoj, do oni portu ilin por la kluba albumo!

III. I n d i v i d u a   i n f o r m a d o

La statistiko montras, ke plejmulto da esperantistoj, kiuj restas en la movado, unue eksciis pri Esperanto dum individuaj interparoloj kun amikoj aŭ dum hazardaj kontaktoj kun esperantistoj. Oni denove povas konvinkiĝi, ke simplaj, sinceraj homaj kontaktoj en la laboro, ligita kun disvastigo de nia kara lingvo, plej efikas. Ĉiu klubano penu ĉie trovi taŭgan momenton por informi ĉeestantojn pri Esperanto. Por multaj ja tio estos io nova, kaj ĉio nova estas interesa. Do unua tasko de ĉiu esperantisto estas - jam ekde la kome-

ncaj paĝoj en Esperantujo interese informi aliajn pri la Internacia Lingvo. Uzu fotoalbumojn, viajn kolektojn de esperantaĵoj, alilandajn bildkartojn k.s.

- - -

La informa laboro estas tamen tiel varia, interes.. kaj vere necesa, ke vi, legante ĉi tiun artikolon, jam komprenis, ke via klubo ankoraŭ ne ĉion faris ĉi-rilate, ĉu ne? Kompreneble, nun vi jam konvinkiĝis, ke necesas urĝe fondi viakluban populariga̧n fakon, kiu koordinos tiel ampleksan laboron. Sendu viajn proponojn al "Aktuale", rakontu pri via sperto kaj tuj - mi petas vin, tuj - kunlaboru kun Populariga fako de SEJM.

A.Medinŝ, unua vicprezidanto de SEJM.

## UNUAVICE - ORGANIZECO DE ESPERANTO-PROPAGANDO

Kiam mi parolas pri Esperanto kun neesperantistoj, ili ofte miras kaj demandas: "Esperanto? Strange... Mi ĝis nun ne aŭdis pri ĝi... Verŝajne oni malbone propagandas ĝin? Pro kio?.."

Evidente ne nur al mi ne plaĉas tiu ĉi demando. Post du jaroj da aktivado en SEJM mi povas konkludi: SEJM ne organizas propagandon de Esperanto. La propagando disvolviĝas surloke, neorganizite, laŭ kapabloj kaj scioj de la lokaj E-klubanoj. Nu, vi tion ĉi sufiĉe bone scias, kara leganto, laŭ via ne ĉiam sukcesa sperto. En la 10-a SEJM-Konferenco oni fondis Propagandan fakon de SEJM kaj elektis la fakestron. La fakestro laboris bone, sed ĉu same bone funkciis la fako? Laŭ mi, okazis paradokso: la fako siajn taskojn tamen ne plenumas. Kion mi volas diri? Nuntempe ni bezonas ne simple la fakestron, ne simple la fakon. De ni oni atendas <u>bone organizitan centron de E-propagando en tutsovetia skalo</u>. SEJM devas laborigi tie plej perspektivan junularon, havantan la deziron organizi la propagandon, plivastigi ĝin kaj plialtigi ĝian kvaliton. Ne timu, gekamaradoj! Dekomence ni devas fari iom pli malmulte... Al la nuna PF-estro k-do Kuprienko, same - al la tuta SEJM-anaro mi proponas fari jenajn organizajn paŝojn: 1) pripensi la strukturon kaj organizon de la fako; 2) fondi la propagandan komisionon; 3) komenci la agadon...

Pli konkrete pri la strukturo:

1) Fakestro - ĝenerala gvidado de la fako kaj komisiono.

2) Respondeculo pri sekcio de gazetara informado - kompilado de tutlanda adresaro (centraj, respublikaj, regionaj, distriktaj gazetoj kaj ĵurnaloj); dissendado de E-informaj materialoj (multobligitaj) al la redakcioj.

3) Respondeculo pri sekcio de radia kaj televida informado - la taskoj similas al tiuj de la gazetara sekcio.

4) Respondeculo pri sekcio de montra agitado (inkluzive Fotoservon de SEJM) - preparo kaj demonstrado de albumoj, ekspozicioj, emblemoj, afiŝoj ktp; diversaj konkursoj; lumbildoj, kinofilmoj.

5) Respondeculo pri sekcio de prelega propagando - organizado de pli efika E-prelegado.

6) Respondeculo pri sekcio de kontaktoj kun oficialaj instancoj - ĉefa tasko: organizado de tutsovetiaj kampanjoj.

7) Respondeculo pri "Propagandaj kajeroj de SEJM" - redaktado de ruslingva kolekto de diversaj indaj por amaso propagandaĵoj: artikoloj, memoraĵoj, eldiroj, faktoj pri Esperanto kaj la movado, taŭgaj por bona kaj vasta propaganda laboro.

8) Respondeculo pri MEM-sekcio - organizado de la porpaca agado surloke.

9) Respondeculo pri informa servo de SEJM - la sama tasko, kia

estas nun.

Ĉiuj naŭ gekamaradoj formu la propagandan komisionon de SEJM. Ili interkontaktu pere de cirkuleraj leteroj, pridiskutante ĉiujn aktualajn problemojn de E-propagando. Ilia tasko estu: koordini kaj organizi la propagandan laboron pere de SEJM en Sovetunio. Tamen, almenaŭ por la komenco, en ĉiu klubo devas esti elektota respondeculo pri E-propagando, por ke la komisiono povu kontakti kaj instrukcii la klubojn, ankaŭ - ricevi reeĥojn, informojn el la lokoj.

Sola homo (la fakestro) nenion sukcesos fari en la organizeco de nia E-propagando. La komisiono devas ekfunkcii kaj okupiĝi pri organizo kaj centralizo de la afero. Nur vaste organizita propagando povos doni pozitivajn rezultojn. Do, ni celu al tio ĉi !

Tiu ĉi artikolo estas mia propono al la fakestro kaj alvoko al la SEJM-anaro: amase helpu al aktivigo de la propaganda laboro, sendu viajn proponojn al la fakestro. Ni bonvenigas ankaŭ sinproponojn por tiu aŭ alia sekcio. Ni ne perdu la tempon, geamikoj. Ni jam sufiĉe ĝin perdis.

V.Sapoĵnikov, komitatano de SEJM.

## LA UTILA PROPONO

Mi temas pri la artikolo de B.Anoĥin "Kiel lukti kontraŭ 'senpeza ŝelaro' " en "A" N-o 6(39).

Jes, ekzistas multaj vastekonataj favoraj eldiroj de famuloj pri Esperanto aŭ pri la problemo de interlingvo. De tempo al tempo en revuoj aperas novaj eldiroj. Estus bonege kunigi ilin ĉiujn en apartan libreton.

Mi proponas, ke la opiniaro konsistu el du partoj. La unua: citaĵoj, opinioj, eldiroj de eminentaj (politikaj, sociaj, sciencaj ktp) agantoj; la dua: eldiroj ne mondkonataj, sed ankaŭ saĝaj kaj aktualaj, kies aŭtoroj estas ordinaraj esperantistoj.

Vere skribis B.Anoĥin - necesas nur trarigardi niajn E-arkivojn kaj zorge kolekti la kaŝitajn trezorerojn.

Mi mem promesas dum proksima tempo disponigi al Populariga fako centon da eldiroj. Precipe ili apartenas al niaj aktivaj veteranoj. Por ĉi tiu afero mi relegis la kolekton de la bulteno "Unuiĝo" el la jaroj 1966 - 69. La citaĵojn oni povas utiligi ankaŭ sur la paĝoj de "A", sed ĉefa celo estu la aparta libreto. Ĝi ege helpos al nia propaganda laboro.

En la sama kolekto aŭ aliloke certe oni povas lokigi subjektivajn, eĉ stultajn, eldirojn de niaj malsimpatiantoj. Por tiu ĉi rubriko mi proponas ironian, eĉ sarkasman, titolon: "La muzeo de filistro". Ĉu taŭgas?.. Kelkajn konvenajn "humuraĵojn" mi ankaŭ sendos poste kaj alvokas ĉiujn fari same. Ja ĉiu povas rememori iujn presitajn aŭ eldiritajn dum disputoj "perlojn" de niaj kontraŭuloj kaj skeptikuloj.

Multaj kluboj kaj apartaj samideanoj skribis leterojn al diversaj instancoj. Ili ricevis sufiĉe multajn oficialajn respondojn. Redakcioj, eldonejoj, aŭtoritataj funkciuloj ofte eldiris pri Esperanto bonajn, freŝajn vortojn. Ankaŭ ilin ni kolektu kaj utiligu en nia laboro. El la sama fonto oni povas kolekti maltrafajn kaj ne tre saĝajn eldirojn aŭ sugestojn.

V.Ĉernov (Kaluga).

## GVIDI NECESAS LERNI

- daŭrigo el la antaŭa numero -

PSIKOLOGIA FLANKO

Alta morala stato estas en tiu E-klubo, kie ne mankas fido al siaj propraj fortoj, kie oni konscias la gravecon de taskoj, sta-

rantaj antaŭ E-movado. Tasko de la gvidanto estas atingi, ke la homoj kredu la ideojn por kies efektivigo ili estas vokataj batali. Tiu ne defendos E-movadon, kiu en ĉeesto de sia laborejestro timas porti la verdan stelon, hontas inviti kunlaborantojn al E-klubo, E-kurso. Ni ne forgesu, ke neniu grupo konsistas el "pretaj" ideaj esperantistoj. Ni devas labori tiel, ke dum la laborado ili iĝu tiaj. La gvidanto devas studi la subulon - kion tiu ŝatas, kion ne, kion scipovas, kia estas atmosfero en ties familio, kiel tiu akceptas humuron ktp.

Ĉiu kolektivo konsistas el individuoj. Ni jam scias, ke dum la distribuado de taskoj necesas atenti ne nur la psikologian atmosferon (moralan staton) en la kolektivo, sed ankaŭ personecan strukturon de individuo.

La personecan strukturon konsistigas: a) temperamento, b) edukiteco, c) kvalifiko (kapabloj).

T e m p e r a m e n t o estas la plej konstanta trajto de homo (la karaktero povas dumtempe ŝanĝiĝi, la temperamento - ne). Oni nombras 12 tipojn de temperamentoj, sed ili estas kombino de 4: la sangvina, la kolerika, la flegma kaj la melankolia. Mi memorigu al vi la distingojn.

Sangvinulo - rapide al ĉio reagas kaj orientiĝas; travivadas ŝajne profunde; rapide kontaktiĝas kaj disiĝas; malŝatas monotonan laboron; estas optimisto.

Kolerikulo - ankaŭ rapide reagas, eĉ krude; travivadas tre profunde; povas entrepreni kion ajn, ŝatas riskon; en laboro persistas, eĉ obstinas; ne ĉiam atingas la celon, ĉar kutime surprenas tro multe da laboro.

Flegmulo - estas ekvilibra, nur fortaj travivaĵoj povas skui tiun; posedas malrapidajn psikajn procedojn; ne ŝatas ŝanĝi agadsferon; posedas profundajn sentojn; havas amikojn, sed ne multajn; laboras pli malrapide ol aliaj, sed sisteme kaj ĝis la fino; estas kontenta pri si mem kaj pri sia vivmaniero.

Melankoliulo - tre senteme reagas al ĉio; kio rilatas ties personecon; tre malrapide adaptiĝas al nova situacio; malfacile kontaktas homojn kaj ofte estas soleca; tre suferas pro ĉiu sia malsukceso kaj kulpigas pri tio sin mem; ne tro aktivas; estas pesimisto.

Nun estas evidente, kial necesas atenti temperamenton ĉe distribuado de taskoj: sangvinulo apenaŭ diligente plenumos la temporaban, sed monotonan sekretarian laboron en la klubo; melankoliulo apenaŭ povos sukcese (sen konstanta kuraĝigo) gvidi iun fakon; kolerikulon necesos "aŭspicii", por ke tiu ne "disĵetadu sin", sed plenumu nur difinitan taskon.

Grandan signifon havas e d u k i t e c o de gvidato. Edukiteco estas tuta komplekso de interesoj, idealoj, mondkoncepto, ŝatoj. Oni distingas jenajn tipojn:

a) ekonomia-praktika - tiu agas nur tiom, kiom tio utilas al ĝi mem;

b) teoria-scivola - al tiu en kiu ajn situacio gravas, de kie kaj pro kio tio aperis; tiu estas malbona praktikulo, ema al teoriumado;

c) estetika-impresiva - por tiu gravas agi bele, sed ne nepre juste;

ĉ) idea-morala - por tiu gravas malpli la hodiaŭo, ol iama estonto;

d) politika - tiu ŝatas regi super la aliaj, almenaŭ super unu persono (ekz. edzo super la edzino);

e) socia - zorgas pli multe pri la aliaj, ol pri si mem.

Pura tipo apenaŭ ekzistas, sed unu el ili dominas en la homo. Ŝajnas al mi, ke la tipon de edukiteco necesas atenti ĉe elektado al certaj estraraj postenoj ktp.

Trakti k v a l i f i k o n pli profunde apenaŭ necesas. Ĉiuj senpruve konscias ĝian signifon; ja tiu kiu ekz. neniam interesiĝis pri poezio, apenaŭ kontentigo prelegos pri ĝia beleco, ktp.

GVIDI POVAS ĈIU

Vi konsentos kun mi: gvidi povas ĉiu, kiu deziras gvidi. Tamen ne ĉiu povas esti bona gvidanto. Krom la scioj pri arto de gvidado estas dezirinde, ke la gvidanto volu gvidi (politika, sed ne teoria tipo), estu societema kaj optimisma (ne melankoliulo!), estu de alta persona kulturo, scipovu antaŭvidi perspektivon (realisto, kompetenta pri la afero).

Ofte oni faras eraron: tiun, kiu bone regas la lingvon aŭ profunde scias iun fakon, oni senpripense devigas esti gvidanto - tiel oni riskas perdi bonan fakulon kaj ne akiri bonan gvidanton. Estas pli utile altiri tiajn personojn al la laboro kiel konsultantojn kaj ĝenerale lasi ilin kreadi.

Por bone sukcesi en la gvidado necesas atingi, ke la subuloj deziru esti gvidataj (ĝenerale kaj speciale de Vi!). Kiel tion atingi? Kelkaj subaj konsiloj faciligos al Vi la gvidadon:

1) sciu nomojn de la gvidatoj, memoru iliajn naskiĝdatojn;
2) interesiĝu pri eksterkluba vivo de la gvidato (sed ne penu ekscii ĉion pri tiu);
3) neniam primoku la gvidaton, estu ĝentila;
4) evitu riproĉi la gvidaton en alies ĉeesto;
5) komprenigu la gvidaton, ke ties laboro estas tre grava;
6) laŭdu la gvidaton, se aperas taŭga okazo;
7) mem estu ekzemplo laŭ konduto kaj aspekto;
8) neniam nervozu;
9) memoru, ke al tre junaj membroj de la kolektivo ne plaĉas, kiam oni insistas pri siaj opinioj;
10) elaŭskultu opiniojn de la subuloj;
11) evitu fari tion, kion povas plenumi la subulo;
12) ridetu!

& & &

Pri problemoj de gvidado jam aperis multaj artikoloj en nacilingvaj periodaĵoj, fojfoje aperas ankaŭ pli-malpli utilaj por ni libroj. Ĉi tiu artikolo ne estas pionira laboro - ĝi respegulas la materialon de la aperintaĵoj, kribritan tamen per sukcesoj kaj malsukcesoj de la aŭtoro mem. Povas esti, ke la scivolema leganto deziros ekscii iun flankon de la gvidado pli profunde - mi estas preta daŭrigi la temon. Miavice, mi ŝatus, ke ĉi tiu artikolo komencu interŝanĝadon de gvido-sperto (certe, ne nur de la pozitiva: ankaŭ malsukcesoj povas esti instruaj).

V.Ŝilas (Vilnius).

LA STATISTIKO
DE OkSEJT-19 KAJ LA 11-A SEJM-KONFERENCO

Pro nesufiĉa akurateco de kelkaj partoprenintoj de la Tendaro kaj Konferenco, kiuj nur parte aŭ tute ne plenigis la aliĝilojn, la statistiko estas nekompleta (ĉiu indika nombro fakte signifas "ne malpli ol ...").

Por partopreno en la Tendaro kaj Konferenco estis ricevitaj aliĝiloj el 71 loĝlokoj.

La Tendaron partoprenis pli ol 200 personoj el 59 loĝlokoj, la Konferencon - pli ol 120 personoj el 51 loĝlokoj. Ĉi-sube en ĉiu paro de nombroj, dividitaj per oblikva streko, la unua indikas la Tendaron, la dua - la Konferencon.

Laŭ sekso: virinoj - 105/51, viroj - 91/56.
Laŭ partieco: membroj kaj kandidatoj de KPSU - 21/13, membroj de VLKSM - 104/51, pioniroj kaj oktobridoj - 12/5, nepartianoj - 60/39.
Laŭ klero: supera - 94/55, nefinita supera - 29/13, meza speciala - 15/7, meza - 33/20, nefinita meza - 23/10, antaŭlerneja - 2/2.
Laŭ scienca titolo aŭ grado: profesoroj - 2/1, doktoroj - 1/0, kandidatoj - 4/2, docentoj - 2/0.
Laŭ profesio: studentoj - 40/17, instruistoj - 37/20, inĝenieroj - 37/15, oficistoj - 27/21, lernantoj - 21/10, laboristoj - 11/8, pensiuloj - 6/6, kuracistoj - 6/3, ĵurnalistoj - 2/2, tradukistoj - 2/2, pentristoj - 2/0, lingvistoj - 1/1, antaŭlernejanoj - 2/2, aliaj - 2/0.
Laŭ posedo de la lingvo: perfekte - 24/22, bone - 50/44, kontentige - 46/23, elemente - 73/16.
Laŭ E-aĝo: denaskaj - 3/3, ĉ. 1 jaro - 53/6, ĉ. 3 j. - 68/34, ĉ. 5 j. - 16/11, ĉ. 10 j. - 28/23, ĉ. 15 j. - 10/12, ĉ. 20 j. - 10/10, pli ol 25 jaroj - 6/5.
Laŭ partopreno en E-aranĝoj: eksterlandaj - 5/7, SEJT unufoje - 21/25, SEJToj kelkfoje - 44/50, BETo j - 33/25, diversaj enlandaj renkontiĝoj - 52/42, antaŭe ne partoprenis E-aranĝojn - 73/23.
Laŭ aĝo: ĝis 8 jaroj - 2/2, ĝis 18 - 23/10, ĝis 28 - 87/42, ĝis 35 - 34/21, ĝis 45 - 24/15, ĝis 55 - 12/6, pli ol 55 - 10/8.
Laŭ nacieco: rusoj - 113/53, ukrainoj - 48/30, hebreoj - 10/9, litovoj - 6/3, germanoj - 3/1, estonoj - 2/2, armenoj - 2/0, grekoj - 2/0, azerbajĝanoj - 1/1, baŝkiroj - 1/1, kartveloj - 1/1, lakoj - 1/1, latvoj - 1/1, belorusoj - 1/0, ĉuvaŝoj - 1/0, kazaĥoj - 1/0, moldavoj - 1/0, tataroj - 0/2.

Kompilis V.Grigorenko (Poltava).

## PRI "ORA FOLIO 77".

La 5-an - 8-an de novembro en latva vilaĝo Pociems okazis la tradicia E-renkontiĝo "Ora Folio 77". Ĉi-jare ĝin partoprenis 28 personoj el Pärnu, Riga, Tallinn, Haapsalu, Vilnius, Moskvo, Kievo, Kaunas, Limbaĵi, Valmiera. La renkontiĝo estis dediĉita al la 60-a datreveno de Granda Oktobra socialisma revolucio. Tre sukcesa estis la prelego de k-do A.Ĥarkovskij "Esperanto kaj Oktobro". Dum la renkontiĝo okazis fruktodona seminario pri temoj: "Kiel batali kontraŭ malapero de kursfinintoj?" kaj "Kiel organizi klubkunvenojn?". Interese pasis piedmarŝo, kiun gvidis loka esperantistino. Vespere la gastoj partoprenis la tradician karnavalon. Estis aranĝita ankaŭ konkurso pri E-literaturo kaj konkurso-ekspozicio de fotaĵoj. Interese pasis konkurso de mallonga rakonto.
La riganoj kore invitas ĉiujn esperantistojn al Novjara festo, kiu okazos en Latvio. Informo pri ĝi sekvos.

A.Mivrenieks, renkontiĝestro de REJK.

## KIEL NI ORGANIZAS LA KLUBAJN KUNVENOJN

Kun granda intereso mi konatiĝis kun la nova sistemo de klubkunvena organizo, proponita de k-do A.Medinŝ (Riga) en "A" №3(47).
Fakte io simila okazas ĉiusemajne en Krasnojarska urba E-klubo. Tamen iom alimaniere. Ni havas programon de laborkunvenoj de la klubo por certa periodo, kompilatan el kompletoj de E-rubrikoj.
Ĉi-jare nia programo enhavas 10 rubrikojn: 1) "Laŭ paĝoj de E-gazetaro" (respondecas N.Seljodkina), 2) "Soveta gazetaro pri Espe-

ranto" (L.Sutugina), 3) "SEJM-informado" (S.Bronov), 4) "Deziras korespondi" (V.Elpaŝev), 5) "Nova E-kanto" (O.Urdajeva), 6) "Interna informado" (V.Sapoĵnikov), 7) "E-prelegejo" (I.Stepanova), 8) "Tema vespero" (I.Danilin), 9) "Ĉe ni gastas..." (V.Lysenko), 10) "Vespero de naskiĝinto" (E.Potapova).

Ĉi tiujn dek rubrikojn ni distribuis laŭ kompletoj jene: A - 3, 1,7; B - 6,2,8; C - 3, 4, 9; D - 6,5,10. Kaj poste por ĉiu kunvendato ni fiksis certan kompleton. Ekzemple, novembre: la 16-an - A, la 23-an - B, la 30-an - C; decembre: la 7-an - D, la 14-an - A, la 21-an - B, ktp.

Ĉiusemajne antaŭ la kunveno sekretario de la klubo memorigas al la respondeculoj, kies vico proksimiĝas, pri iliaj devoj. Tiuj preparas la rubrikojn laŭ sia bontrovo. Kaj dum la unua horo de la sekva kunveno estas okazigataj tri rubrikoj, kutime - interese preparitaj. Dum la dua horo ordinare ni organizas kurson por E-aktivularo (la direktoj: propagando de E., organizo de E-agado, traduka laboro, instrua laboro). En la paŭzoj (kaj dum aliaj tagoj) funkcias la kluba E-biblioteko, libroservo kaj abonservo.

La aliajn klubajn aranĝojn, kiuj ne povas esti konstantaj - nur por unu fojo - planas, efektivigas kaj kontrolas la kluba estraro. Nu, tio jam estas alia temo. Pri laborkunvenoj de la klubo ni havas propran opinion: ili devas esti ne nur distraj, sed unuavice - laboraj, informplenaj. Tamen la aktivuloj - organizantoj devas plenforte klopodi ne enuigi la kunvenojn - ili devas ja esti interesaj (i.a., tio ne ĉiam validas pri la niaj...).

V.Sapoĵnikov, prezidanto de Krasnojarska E-klubo.

## PRI LA LANDAJ SEKCIOJ DE TEJO

En la agadjaro 1976/77 la Estraro de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo dissendis al siaj 28 Landaj Sekcioj kaj al 10 nealiĝintaj grupoj ampleksan enketilon por ricevi ĝeneralan bildon pri la stato de la junulara E-movado. La venintaj respondoj (16 Landaj Sekcioj kaj 2 nealiĝintaj grupoj) estas sumigitaj en analiza raporto, kompilita de la TEJO-estrarano pri Landaj Sekcioj Stefan MacGill. Ĉi-sube estas prezentitaj la bazaj informoj pri LS-oj, ĉerpitaj el tiu raporto.

B e l g i o : Belga Esperantista Junulara Asocio (BEJA), junulara sekcio de Belga Esperanto-Federacio. Estraro 3-persona, reelektata ĉiuprintempe. Membraro - ĉ.70. Organoj: "Koncize" (kun aliaj kvar LS-oj), dumonata, 8-12-paĝa; "JEN..." (kun la nederlanda LS), nacilingva, dumonata. BEJA kunlaboras kun ne-E-instancoj, varbas ĉefe per personaj kontaktoj. Grupoj de BEJA-anoj partoprenis renkontiĝojn en Nederlando kaj FRG.

B r a z i l o: Brazila Esperantista Junulara Organizo (BEJO), sendependa de la Landa Asocio de UEA (sed kunlaboras kun ĝi). Fondiĝis en 1967. Estraro ĉ. 12-persona, reelektata ĉiun duan jaron. Membraro: 41. Organo: "BEJO informas", neregula, 2-6-paĝa. BEJO kunlaboras kun diversaj landaj E-movadoj. BEJO-anoj gvidas E-kursojn en diversaj filozofiaj grupoj. Okazis la unua brazila E-muzikfesto, organizita de BEJO. Estas aŭspiciataj E-rubriko en ĵurnalo, sportaj E-teamoj. BEJO prizorgas eksterlandajn gastojn de la E-komunumo "Bona Espero". Estas planate organizi latinamerikan seminarion kaj starigi komunan sudamerikan informilon.

B r i t i o : Junularo Esperantista Brita (JEB), junulara sekcio de Brita Esperanto-Asocio. Fondiĝis en 1959. Komitato 7-persona, elektata ĉiuprintempe. Membraro: 121. Organoj: "Koncize"; "Saluton", anglalingva, dumonata, 2-8-paĝa. JEB havas membron en la

Estraro de Brita E-Asocio. JEB aktive kunlaboras kun la "Grupo 5", kiu celas enkonduki Esperanton en universitatojn pere de radio kaj TV. JEB-anoj instruis Esperanton al infanoj dum tendaro de ne-E-organizaĵo. Dum la brita E-kongreso JEB havis informbudon. Estas organizataj JEB-semajnfinoj. Estas planate intense kunlabori kun la landa sekcio de ILEI por stimuli aliĝon de E-lernantoj al JEB. Oni eldonis anglalingvan varbilon "JEB estas por vi!".

B u l g a r i o : Bulgara Esperanto-Junularo (BEJ), junulara sekcio de Bulgara Esperantista Asocio. Fondiĝis en 1958. Estraro 5-persona, elektata por 4 jaroj. Membraro: 3100. Propra organo ne estas, la agado de BEJ estas prezentata en "Bulgara Esperantisto", la organo de BEA. BEJ kunlaboras kun Dimitrov-Komsomolo, kiu helpas materiale. BEJ organizas diversajn E-renkontiĝojn, konferencojn ktp., aparte menciindas la internaciaj laborbrigadoj. Nun BEJ preparas la 34-an Internacian Junularan Kongreson en Veliko Târnovo somere 1978.

D a n l a n d o : Dana Esperanto-Junularo (DEJ), memstara. Fondiĝis en 1972. Estraro 5-persona, elektata ĉiuaprile. Membraro: 45. Organo: "Hermeso" en kadroj de "Eĥo" - la organo de Dana E-Asocio, 6-foje jare, 3 paĝoj en ĉiu numero. DEJ kunlaboras kun DEA. Estas kontaktoj kun polaj E-studentoj. DEJ ne disponas pri spertaj E-instruistoj, sed pretas helpi per instrumaterialo. Oni planas eldoni informajn presaĵojn por diversaj junularaj organizaĵoj. DEJ havas informservon, kiu informas pri E-renkontiĝoj kaj aliaj manieroj por utiligi la lingvon. Estas eldonitaj du informfalioj danlingvaj, kun ilustraĵoj. turisma kalendaro.

G e r m a n a  D R : Junulara Komisiono (JK) de Centra Laborrondo Esperanto. Fondiĝis en 1968. Estraro 6-persona, elektata ĉiun trian jaron. Membraro: ĉ. 170. Propran organon JK ne havas, ricevas spacon en "der esperantist", la organo de CLE. JK laboras en kadroj de Kulturligo de GDR kaj kunlaboras kun Libera Germana Junularo. Oni varbas per gazetartikoloj, prelegoj, buŝa propagando. Aperis kolorkovrila E-broŝuro "Junularo", filmo pri la junularo de GDR. En 1973 oni partoprenis la Mondan Junularan Festivalon en Berlino.

F R  G e r m a n i o : Germana Esperanto-Junularo (GEJ), junulara sekcio de Germana E-Asocio. Fondiĝis en 1951. Estraro 7-persona, elektata por 2 jaroj. Membraro: 696. Organoj: "Koncize"; "GEJ-Notizen", germanlingva, 6-foje jare, 4 paĝoj; GEJ-informoj en "Esperanto en FRG", bulteno por infanoj kaj bulteno por kunlaborantoj. GEJ kunlaboras kun Germana E-instituto, kun aliaj LS-oj, kun Asocio de E-instruistoj en Germanio, kun la Universitata Centro en Paderborn. GEJ aktive kunlaboras kun ne-E-instancoj kaj ricevas subvenciojn de ili. Ĝi estas membro de tegmenta landa junulara asocio kaj aperigas E-informojn en ties gazeto. GEJ organizas intensajn lingvoprogresigajn kursojn. Oni organizas riĉenhavajn internaciajn seminariojn, regionajn kaj lokajn renkontiĝojn. Aperis varbilo "Ni informas" kun trafa teksto kaj fotoj.

H i s p a n i o : Hispana Esperanto-Junulara Sekcio (HEJS) de Hispana Esperanto-Federacio. Fondiĝis en 1959. Estraro 4-persona, provizora. Membraro: ĉ. 300. Organo: "HEJS-bulteno", dumonata, 20-paĝa. HEJS presis bonkvalite 4-paĝan Universalan Deklaracion de la Ligo Internacia por la Rajtoj kaj Liberiĝo de la Popoloj. Oni organizas HEJS-tendarojn. Oni planas plifortigi ligojn kun TEJO kaj ĝiaj Landaj Sekcioj.

H u n g a r i o : Hungara Esperanto-Junularo (HEJ), junulara sekcio de Hungara E-Asocio. Fondiĝis en 1963. Estraro 4-persona, elektata ĉiun kvaran jaron. Membraro: 1100. HEJ ne havas propran organon, ricevas spacon en "Budapeŝta Informilo", la organo de HEA. HEJ kunlaboras kun LS-oj de najbaraj socialismaj landoj. Pri organizo de tendaroj, vojaĝoj ktp. ĝi kunlaboras kun ne-E-organizaĵoj.

HEJ ricevas subvenciojn de la Nacia Junulara Komitato. Sukcese pasas landaj renkontiĝoj kaj tendaroj por mezlernejanoj.

I t a l i o : Itala Esperantista Junularo (IEJ), junulara sekcio de Itala Esperanto-Federacio. Estraro 9-persona, reelektata ĉiuseptembre. Membraro: ĉ. 320. Organo: "Nova Sento" en kadroj de "L'Esperanto" - la organo de IEF, dumonata, 1 paĝo en ĉiu numero. IEJ eldonis plurajn kantlibrojn, diversajn broŝurojn E- kaj itallingvajn. Bone funkcias koresponda servo. IEJ aktive prezentis sin en la landa E-Kongreso. Oni organizis Internacian Festivalon kun varia programo.

J u g o s l a v i o : Jugoslavia Esperantista Junulara Asocio (JEJA), junulara sekcio de Jugoslavia Esperanto-Ligo. Fondiĝis en 1956. Kunordiga komitato de JEJA konsistas el reprezentantoj de respublikaj E-asocioj, la administradon prizorgas 3-persona plenumkomitato. Membraro: ĉ. 4500. JEJA ne eldonas propran organon, sed ekzistas informiloj de la respublikaj junularaj E-organizaĵoj, el kiuj JEJA konsistas: "Informilo"- organo de Kroatia E-Junulara Asocio, duone kroatlingva, 6-foje jare, 2 paĝoj; "Esperbih", plejparte serbkroatlingva, 6-8-foje jare, 2-paĝa,- organo de Junulara E-Ligo de Bosnio kaj Hercegovino. JEJA kunlaboras kun pluraj LS-oj. En la respublikoj la junularaj E-asocioj estas integraj partoj de oficialaj junularaj organizaĵoj kaj ricevas de ili subvenciojn, ekz. por laborbrigadoj. Estas aliro al gravaj gazetoj. Oni organizis Puptetran Internacian Festivalon, socilingvistikan seminarion k.a.

N e d e r l a n d o : Nederlanda Esperanta Junularo (NEJ), sendependa. Fondiĝis en 1965. Estraro 5-persona, elektata ĉiuprintempe. Membraro: 85. Organoj: "Koncize"; "JEN..." (kun BEJA), 12-paĝa. NEJ kunlaboras kun Internacia E-Instituto en Hago, informas al FEN (federacio de la landaj E-organizaĵoj). De ne-E-organizaĵo ELVAS NEJ ricevas subvenciojn kaj iam reprezentantojn por siaj aranĝoj. NEJ organizas informvesperojn, starigas E-budojn en publikaj foiroj ktp. En la laboro NEJ aktive uzas vidbendan teknikon. NEJanoj eldonis en E. flugfoliojn de "Monda Alternativo" - grupo kiu batalas kontraŭ naturdetruo kaj akceptis E-on kiel duan laborlingvon. Regule estas aranĝataj la semajnfinaj renkontiĝoj.

N o v - Z e l a n d o : Esperanta Junulara Asocio de Nov-Zelando (EJANZ), junulara sekcio de Nov-Zelanda Esperanto-Asocio. Fondiĝis en 1966. Estraro 6-persona, elektata ĉiujanuare. Membraro: 80. Organo: "Junularo", 4-6-foje jare, 8 - 28 paĝoj. EJANZ ĉiujare organizas tendarojn kaj aliajn renkontiĝojn. Oni vigle agas en universitato. Estas eldonitaj instrulibretoj.

P o l l a n d o : Pola Esperanto-Junularo (PEJ), junulara sekcio de Pola E-Asocio. Fondiĝis ĉ. 1958. Estraro 5-persona, elektata ĉiun duan jaron fare de Ĉefa Estraro de PEA. Membraro: 2000. PEJ ne havas propran organon, klopodas pri junulara rubriko en "Pola Esperantisto", organo de PEA. PEJ intencas kunlabori kun Pola Studenta E-Komitato (funkcianta en kadroj de Socialista Asocio de Polaj Studentoj), kun la skolta movado kaj Socialista Pola Junularo. Okazas diversaj renkontiĝoj, interlingvistikaj kaj aliternaj seminarioj.

S v e d i o : Sveda Esperantista Junulara Unuiĝo (SEJU), junulara sekcio de Sveda Esperanto-Federacio. Fondiĝis en 1958. Estraro 7-persona, elektata ĉiuprintempe. Membraro: 120. Organo: "Ktp", duone svedlingva, 5-foje jare, 2-6-paĝa. Oni organizas diversajn renkontiĝojn, seminariojn.

S v i s l a n d o : Svisa Esperanto-Junularo (SEJ), sendependa. Fondiĝis en 1970. Estraro 3-persona, elektata ĉiujare. Membraro: 58. Organo: "hej!", preskaŭ ĉiumonata, 2-6-paĝa. SEJ organizas junularajn semajnfinojn, agas en lernejoj, havas teatran grupon.

Reĝnis ankaŭ nealiĝintaj grupoj de Finnlando kaj Kanado.

## OMAĜE AL NIA KARA KAMARADO RUDI GRAETZ

Forpasis nia kara samideano, kamarado Rudi Graetz. Dolore skuiĝis la koroj eĉ de tiuj esperantistoj, kiuj, kiel mi, ne konis lin intime. Tamen ni ne ploru, ke li mortis, sed danku, ke li vivis kaj agis inter ni Por mi kamarado Graetz ĉiam restos ne nur viva, sed ankaŭ juna, kiel junas la ideo pri Lingvo Internacia, kiel junas la ideo pri komunismo - li servis al ambaŭ, ilin kunigante. Mi imagas lian E-junaĝon en dudekaj jaroj kaj indignon de neŭtralaluloj kontraŭ Rudi Graetz, kiu kune kun siaj kamaradoj "altrudis politikon al esperantistoj". Mi imagas grumblon de niaj karaj pioniroj, konservintaj Lingvon Internacian dum la unua mondmilito. Eble ili diradis ke la junuloj el la generacio de Rudi Graetz ŝatas nur sin gajigi, ĉar ne scias teruron de milito. Tamen venis la plej kruela tempo - hitleraj mallumaj jaroj, la dua mondmilito - kaj tiuj "petolaj knaboj" kiel Rudi Graetz konservis siajn du fratajn ideojn - Esperanton kaj komunismon. Multaj el ili fordonis siajn vivojn en batalfronto kaj faŝismaj koncentrejoj.

Pro kio mi parolas pri junaĝo de Rudi Graetz - mi, kiu naskiĝis kiam la kara Rudi jam delonge aktivis en E-movado? Ĉar li ĉiam fidis la junularon, vidis en ĝi tiujn, kiuj daŭrigos liajn du ideojn, lian vivon. Kiam tute balbutantaj geknaboj kunvenas en E-klubo por kanti kaj danci, ne foriru indigne pro "fuŝado de la granda ideo". Centoj el ili foriros el la movado, dronos en grizecon de ĉiutaga vivo, dekoj restos kiel batalantoj por nia ideo kaj unu el ili estos Rudi Graetz. Li portos alian nomon, havos aliajn inklinojn, tamen li havos saman insiston kaj aŭtoritaton por atingi la celon sopiratan - do en lia brusto batos la juna koro de nia forpasinta kamarado Rudi Graetz. Kaj se tio okazos - kaj ĝi certe estos - kiu kuraĝos diri, ke nia Rudi mortis? Ne kaj denove ne! Li porĉiame restis la sama "petola knabo", unu el fondintoj de IPE, gvidanto de E-movado en GDR, simple li ŝanĝis nomon kaj aspekton.

Atente rigardu vizaĝojn de niaj junaj esperantistoj, kaj vi ekvidos: tiaj homoj kiel Rudi Graetz mortas neniam, ĉar senmortaj estas iliaj ideoj. Prospero de Esperanto kaj komunismo en la tuta mondo estas ilia senmorteco.

A.Ĥarkovskij (Moskvo).

## AMIKA REEĤO

Laŭ alvoko en "der esperantist", represita en "A"-11(44), SEJM-subtenantino F.Faizova (Satka) sendis al E-istoj de GDR albumon por ekspozicio pri la 60-jara jubileo de Oktobro. Responde ŝi ricevis dankleteron de k-do A.Müller, kiu ĉi-sube estas prezentata kun koncizigoj:

"Mi hodiaŭ povas konfirmi la ricevon de via donacaĵo. Mi tre ĝojas pro ĝi! Mi treege dankas al vi en la nomo de nia grupo! La esperantista grupo, la anoj de la Partia Grupo en mia loĝkvartalo, la virina grupo en la loĝkvartalo, mia familio transsendas al vi persone, al ĉiuj esperantistoj, al ĉiuj enloĝantoj el via urbo niajn plej fratajn batalsalutojn kaj elkorajn bondezirojn por multaj sukcesoj en la laboro kaj estonta vivo okaze de la 60-a datreveno de la Ruĝa Oktobro! El profunda koro ni dankas al vi ĉiuj, ke vi kaj via heroa Ruĝa Armeo batalakiris por ni la liberecon kaj la eblecon fondi nian laborist-kamparanan ŝtaton! Nur pro vi ni povas esti fieraj! Eble vi povas publikigi en via loka tag-gazeto niajn salutojn kaj bondezirojn: Vivu viaj lando kaj popoloj! Vivu la Ruĝa Armeo! Vivu la interkompeniĝo de popoloj pere de Esperanto! Vivu la 60-a datreveno de la Ruĝa Oktobro!"

MOZAIKO - MOZAIKO - MOZAIKO - MOZAIKO - MOZAIKO - MOZAIKO - MOZAIKO

## LA REDAKCIO RICEVIS

- la almanakon "Amikeco", sendatan al ni laŭ interkonsento inter la Komitato de SEJM kaj administracio de "Amikeco" surbaze de la Regula/ro de SEJM. En la kajero 24, de kiu komenciĝas la sendado, estas: artikolo de S.Podkaminer "Oktobra revolucio kaj Esperantista movado", beletraĵoj pri la Revolucio, rememoroj de E-veterano V.Riis, materialoj pri estona revolucia poeto kaj E-isto V.Mölder, represaĵoj el "Starto" pri la temo "Lenin kaj Esperanto" kaj el "Nuntempa Bulgario" pri terminoj de administraj unuoj, rakonto de V.Glazunov "La belulino Ajsulu", "Versaĵoj de junaĝa periodo" de L.Jevsejeva, novaĵoj de scienco kaj tekniko.
- adresaron de korespondemuloj el socialismaj landoj, kompilitan de R.Grinŝpan (Taŝkento). Ĝi enhavas 24 adresojn el Bulgario, 28 el GDR, 57 el Hungario, 24 el Ĉeĥoslovakio, 46 el Rumanio, 49 el Pollando, 53 el Jugoslavio. La adrasoj riceveblas pere de Koresponda servo de SEJM (226014 Riga, Glika 9 - 2, S.Neilande).

## NOVAĴOJ EL RIGA

Ĉe Riga pionirpalaco estas organizita E-rondeto por infanoj 12 - 16 -jaraj. La infanoj sukcese lernas Esperanton.

La 15-an - 16-an de oktobro okazis E-renkontiĝo de havenurboj Klaipeda - Riga. La klajpedanoj tre gastame akceptis la rigajn gastojn, gvidis ekskurson tra la urbo kaj al Palanga. Oni solvis demandojn pri kluba kunlaboro kaj decidis pri reciproka renkontiĝo en Riga printempe 1978.

Riga E-klubo ellaboris programon de klubvesperoj por la agadjaro. Ĉiuj vesperoj estas dediĉitaj al famaj E-istoj, al jubileoj de eminentuloj. La junulara klubo aktive kontribuas al tutúrba E-agado per prelegoj kaj distraj programeroj.

## ANONCIĜIS SEJM-DELEGITOJ

en Kievo, Klaipeda, Omsk, Ivanovo. Aplaŭdu al tiuj kluboj kaj mem pripensu la demandon, ĉar necesas urĝe fondi nian SEJM-Delegitan reton.

A.Medinŝ, unua vicprezidanto de SEJM.

## DELONGAJ INTENCOJ REALIĜIS

En Moskvo fondiĝis junulara E-klubo, kiu funkcias ekster kadroj de MIEK. Al la nova klubo aliĝis dudeko da geesperantistoj el la ĉefurbo kaj proksima Apudmoskvo. Prezidanto de la klubo estas P.M. Donskiĥ, SEJM-reprezentantino - Ŝoroĥova Natalja Nikolajevna (adreso: 142717 Mosk. obl., Leninskij r-n, p/o Razvilka 8-a - 71; tel. 114-09-62). La klubo kunvenas la duan kaj kvaran dimanĉon de ĉiu monato je 16.30 en Kulturpalaco de "Metrostroj" (Kostomarovskij per. 3, je unu traminterevalo de Kurska stacidomo).

## AĈETEBLAS EMBLEMOJ

produktitaj en Riga: "Neĝfloketo 76" - 40 k., "Neĝfloketo 77" - 40 k., "BET-18" - 60 k., "Ora Folio 77" - 40 k. Mendojn sendu al: 226050 Riga, p.k. 52, Dace OGRENA.

LA KOMITATO DE SEJM BONDEZIRAS AL LA LEGANTOJ DE "AKTUALE" FELIĈAN KAJ PROSPERAN NOVAN JARON 1978!

---

La informilo estas uzenda nur enlande! Fintajpita 18.12.77.
Ĉiujn materialojn por "Aktuale" sendu laŭ la adreso de la redaktoro: 121019 Moskvo G-19 do vostrebovanija Aroloviĉu Viktoru Semjonoviĉu.